

voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movado
en Stirio kaj de la Esperanto-
Societo „Unueco“ Graz




Mitteilungsblatt der Esperanto-
Bewegung der Steiermark und des
Esperanto-Vereins „Einigkeit“ Graz

Aparta N-ro 381

majo / Mai 2026

ZVR447438603



TOURISMUSINFORMATION REGION GRAZ

7 tagojn semajne je via servo

- informoj
- mendo de ĉambroj
- urb-gvidadoj & rondveturoj
- butikoj por memoraĵoj kaj vendo de biletoj
- kreditbiletoj
- mendo de prospektoj

Herrengasse 16

Tel. +43/316/8075-0; Faks: anstataŭigu la lastan ciferon „0“ per „15“
info@graztourismus.at, graztourismus.at



Hauptplatz

Vi atingas nin per  1, 3, 4, 5, 6, 7




DE LA URBO AL LA KAMPARO EN 10 MINUTOJ

*Tiun ĉi informadon pri la vindidaĵoj
dum nia 111-a UK tradukis nia
korta konsilisto d-ro Klaus Perko.*

Impressum (kolofono): Por la enhavo respondeca: Graz Tourismus komisie de Tourismusverband Region Graz. Koncepto kaj formado: PILZ Werbeagentur GmbH. Fotoj: Tom Lamm, Harry Schiffer, Hans Wiesenhofer, Toni Muhr, Werner Krug, J. J. Kucek, Paul Stajan, Gerald Plattner, Andreas Hofer, Lupi Spuma, Schell Collection, iStock. Tekstoj: ©Graz Tourismus. Preso: Klampfer. Austria-Export-Prospekt. Ciuj informoj kaj prezoj rezerve de kompost- kaj preseraroj (2024)



Specifaj trajtoj de E-asocioj



Principe E-asocioj funkcias laŭ la samaj leĝoj kiel aliaj asocioj. Sed E-asocioj havas specifajn trajtojn kiuj karakterizas ilin. Oni povas kompari ilin kun aliaj asocioj, ekz. kun religiaj, politikaj, kulturaj, popolklerigaj kaj vojaĝorganizaj asocioj. En E-asocio povas troviĝi konstru-elementoj de tiuj asocioj. La popolklerigo (instruado de la lingvo) kaj la organizado de vojaĝoj al internaciaj E-kongresoj estas tamen la bazaj konstruelementoj, dum religiaj kaj politikaj sintenoj ludas rolon en specifaj asocioj. Kultura agado aliflanke postulas altan kvaliton de la agado. Esperanto ja ebligis internacian kunlaboron inter esperantistoj. Sed dum pasintaj jardekoj kiam ankoraŭ ne ekzistis la interreto, tio estis ege malfacila aŭ pro politikaj limigoj eĉ malebla. Nur ĉe internaciaj kongresoj kaj similaj aranĝoj esperantistoj havis la eblecon kontaktiĝi kaj konatiĝi persone kaj povis kune ellabori agadprogramojn. Sed unusemajna kongreso ne sufiĉas por ke tia kunlaboro efike disvolviĝu. Kongreso ja povis vekti entuziasmon, sed post la kongreso tiu entuziasmo perdiĝis pro manko de kontaktoj.

Tial la lokaj kaj landaj asocioj devis mem krei materialojn por agado aŭ aranĝi kunvenojn pritraktante temojn kaj enhavojn el la propra lando. Sed ankaŭ tio ne estis tre sukcesa, ĉar sen la internacia elemento okupiĝo pri Esperanto restas senkreska. Kaj kie ne estas kresko, tie estas muzeo. El espero fariĝis nostalgio. La

asocioj fariĝis pseŭdo-religiaj. Zamenhof fariĝis la savanto. La agado stagnis. La asocioj produktis pli kaj pli da "eternaj komencantoj" kies intereso pri Esperanto limiĝis al partopreno en malmultekosta internacia aranĝo por povi fuĝi el la hejma tristeco almenaŭ dum unu aŭ du semajnoj en la jaro.

La estroj de E-asocioj apenaŭ povis esti motoroj de la movado, ĉar mankis al ili esencaj kapabloj por tia aktiveco. Klubkunvenoj maloftiĝis kaj perdiĝis ĉia entuziasmo. En la asocia kaso ja eble troviĝis ankoraŭ mono, sed oni ne sciis por kio elspezi ĝin. Sen preciza agadplano elspezado de mono kondukus nur al kompleta disfalo de la asocio.

La kreskintaj eblecoj por homoj vojaĝi en la tutan mondon sen Esperanto kaj la uzo de la angla tiucele estis faktoro kiu same kontribuis al la degenero aŭ morto de E-asocioj. Tiu evoluo trafis ankaŭ la internaciajn E-organizaĵojn, sed ĉi tie mi rezignas pri analizo, ĉar mi ne volas ĝeni la preparlaborojn por la venonta UK en Graz. Mi volas aliflanke transiri en mia sekva sonartikolo post unu semajno al la pli esperiga evoluo de nia afero pro la apero de persatelitaj radioelsendoj en Esperanto kaj la apero de la interreto antaŭ pli ol 30 jaroj.

*Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de
Mag. Anton Oberndorfer en Esperanta
retradio.blogspot.com.
<http://aldone.de/retradio>*

Kommt das Dessert tiramisu aus dem Esperanto?

Frage an KI: Kommt tiramisu aus dem Esperanto? tira = tiru; mi = min; su = supren?

KI: Nein, das Wort **Tiramisu** stammt nicht aus dem Esperanto, auch wenn die Ähnlichkeit verblüffend ist. Es handelt sich um ein rein italienisches Wortgewächs.

Die Parallele zwischen den Sprachen ist jedoch etymologisch spannend:

Italienisch/Dialekt: Es leitet sich direkt vom Ausdruck „**tireme su**“ (Zieh mich hoch) aus dem Dialekt von Treviso (Venetien) ab. *tira* (Zieh) + *mi* (mich) + *su* (hoch).

Esperanto: Deine Analyse ist korrekt – *tiru* (Zieh), *min* (mich), *supren* (nach oben). Da Esperanto eine Plansprache ist, die stark auf romanischen Wortwurzeln (wie dem Italienischen und Lateinischen) basiert, nutzen beide Sprachen denselben Stamm für „ziehen“ (*tir-*) und dieselben Pronomina.

Warum es kein Esperanto ist:

Herkunft: Das Dessert wurde in den 1950er bis 1970er Jahren in Italien (Treviso oder Friaul) populär. Zu dieser Zeit war die Bezeichnung im lokalen Dialekt bereits fest verwurzelt, lange bevor sie international bekannt wurde.

Es ist also ein klassischer Fall von verwandten Wortwurzeln, da Esperanto sich beim Italienischen bedient hat, nicht umgekehrt.

*Wir danken für diesen Beitrag
Mag. Walter Klag, der ihn mit
esperanto@chello gesendet hat.*



**Bitte um Spenden für unseren
111. Esperanto-Weltkongress**
*Angesichts unseres Weltkongresses in Graz stehen uns als Verein große Aufgaben bevor. Daher bitten wir herzlich um Spenden entweder als Vorauszahlung des Mitgliedsbeitrages von EUR 24,- für ein paar Jahre oder um eine direkte Spende auf unser Konto **AT60 3843 9000 0583 9964**. Jede, auch kleine Spende ist willkommen und hilft uns sehr.*

Danke für Euer Verständnis!

Der Kassier Karl Reinisch

Impressum *



Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“

Für den Inhalt verantwortlich:

Dr. Heinz-Paul Kovacic

Panoramagasse 3, 8010, Graz

Tel. 0664 3264027

heinz-paul.kovacic@aon.at



Vitamino B 12 kaj la cerbo



De longa tempo medicinistoj scias, ke Vitamino B12 (cianokobalamino) grave influas la cerbajn funkciojn. Manko de tiu vitamino kaŭzas mensmalsanon tre similan al demenco, krom misfunkciado de aliaj korpaj sistemoj. Antaŭ ne longa tempo, esploristoj en usona centro publikigis interesan studaĵon, kiu montras, ke la influo de tiu substanco al la homa sano ne koncernas nur la mankon de sufiĉa kvanto en la korpo. Oni povas preventi problemojn, precipe ĉe maljunaj personoj. Nome, eĉ se ĝi troviĝas en la sango en “normala” kvanto, tamen ĝia influo al la cerbaj funkcioj varias. Alivorte, por mezaĝuloj kaj maljunuloj, pli altaj niveloj de cianokobalamino en la sango ligiĝas al pli malrapida perdo de memoro, praktikaj plenumkapabloj kaj lingvokapablo, kompare kun pacientoj kun malpli alta nivelo. Oni substreku, ke tiuj pristuditaj pacientoj ne suferis de demenco.

En la studo partoprenis preskaŭ 2 mil homoj ĉirkaŭ la aĝo de 60 jaroj, inter la jaroj 1998 kaj 2018. Oni regule mezuris ilian kvanton da vitamino B12 en la sango kaj submetis ilin al neŭropsikaj testoj. Dume, oni taksis ilian memoron, kapablon praktike plenumi taskojn kaj lingvokapablon. La analizoj de tiuj datumoj konsideris faktorojn demografiajn, la

vivstilon, aliajn sanfaktorojn, aĝon, eduknivelon.

Partoprenintoj kun pli altaj niveloj de cianokobalamino montris malpli da perdo de sia kognokapablo, kompare kun tiuj, kun malpli altaj niveloj, rilate al lingvo, memoro kaj praktikaj plenumoj. Ju pli alta la nivelo de vitamino B12, des pli malgrandaj estis la koncernaj perdoj.

La esploristoj konkludis, ke mezaĝuloj devas zorgi pri sia nutriĝo kaj kontroli sian kvanton de tiu grava vitamino en la korpo, cele al prevento de cerbaj misfunkcioj.

Krome, tiu vitamino estas grava ankaŭ por pluraj aliaj funkcioj en la korpo. Ĝi estas nepre necesa por la formado de ruĝaj globuloj (hematioj) en la sango kaj por produktado de energio. La homa korpo ne kapablas mem produkti tiun vitaminon, sekve oni devas alpreni ĝin el sanaj nutraĵoj. Ili troviĝas preskaŭ nur en nutraĵoj devenintaj el bestoj: viando, fiŝoj, ovoj, laktaĵoj. Jen problemo por veganoj!

En la praktiko, jen rekomendo al mezaĝuloj kaj maljunuloj: de tempo al tempo, kontrolu la kvanton de vitamino B12 en via sango, por preventi malsanon.

*Tiu ĉi sonartikolon verkis kaj produktis
Paŭlo S. Viana el **Brazilo**
en *Esperanta retradio.blogspot.com*,
<http://aldone.de/retradio>.*

Sana socio: kiel ni prizorgas unu la alian



Kiam oni parolas pri sano, multaj tuj pensas pri kuracistoj, hospitaloj kaj medikamentoj. Sed vere sana socio ne komenciĝas ĉe la pordo de malsanulejo. Ĝi komenciĝas multe pli frue: ĉe la manĝaĵoj, kiujn ni permesas al ni, ĉe la aero, kiun ni enspiras, kaj ĉe la subteno, kiun ni ricevas, kiam ni ne fartas bone.

En kelkaj landoj, la sanservo estas traktata kiel komerco. Oni devas pagi por vizitoj, ekzamenoj kaj operacioj; kaj foje tiuj kostoj estas tiom altaj, ke homoj simple evitas serĉi helpon. Sed tio ne estas nur individua problemo; ĝi malfortigas la tutan socion. Kiam iu ne ricevas la necesan prizorgon, ĉiuj fariĝas iom pli vundeblaj.

Kontraste, ekzistas landoj, kie kuracado estas universala. Ekzemple, en Kanado aŭ Svedio, ĉiuj havas aliron al kuracistoj kaj malsanulejoj sen devi pagi rekte ĉe la pordo. Kompreneble, ne ĉio funkcias perfekte; kelkfoje oni devas atendi; sed neniu devas timi bankroton pro malsano. Tiaj sistemoj baziĝas sur la ideo, ke sano estas rajto, ne luksaĵo.

Ni ankaŭ ne forgesu pri mensa sano. Ĉiam pli da homoj komencas malkaŝe paroli pri siaj sentoj, pri streso kaj pri depresio. Tio estas bona signo. Bona socio estas tia, kie homoj sentas sin sekuraj por peti helpon. Ĉu temas pri amiko, instruisto aŭ profesia psikologo, gravas havi iun, kun kiu oni povas sincere paroli.

Preventado estas alia ŝlosilvorto. Sanedukado en lernejoj, sportaj programoj por ĉiuj, pura akvo kaj aero: tiuj ŝajnas simplaj aferoj, sed ili havas grandan influon. Se ni zorgas pri tiuj bazoj, ni poste bezonas malpli da kuracado.

Kaj ni revenu al la ideo de prizorgo. En multaj kulturoj, oni kutime prizorgas siajn maljunajn familianojn hejme. Aliloke oni fidus je publikaj programoj. Sed en ĉiu kazo staras la sama demando: kiel ni traktas tiujn, kiuj bezonas pli da helpo? Sana socio estas tia, kie neniu estas forlasita, kaj kie helpo ne dependas de mono aŭ statuso.

Fine, ni memoru: sano ne estas nur privata afero. Ĝi estas komuna. Kiam ni prizorgas unu la alian, ni ĉiuj vivas pli bone, pli longe, kaj kun pli da digno.

Ni meritas mondon, kie la demando ne estas “ĉu vi povas pagi?”, sed “ĉu vi fartas bone?”. Eble ni ne atingos tion tuj, sed ĉiu paŝo en tiun direkton: pli da subteno, pli da kompreno, pli da prevento, vere gravas.

Por montri homan varmecon, ne necesas perfekta sistemo. Sufiĉas la volo prizorgi.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis

Aaron Chapman el Kanado

en Esperanta retradio.blogspot.com,

<http://aldone.de/retradio>.

Hoffnung in Krisenzeiten mit Esperanto

Bei ROTOR, dem Zentrum für zeitgenössische Kunst in der Volksgartenstraße wurde bei der Ausstellung „Im Rad der Emotionen“ ein Klassenzimmer mit Esperanto installiert.



Weil schon der Name der Sprache „Hoffender“ bedeutet, zeigten die ungarischen Künstler Tamás Kaszás und Anikó Loránt einen schnell eingerichteten Zufluchtsort, an dem sich Menschen mit gemeinsamer Sprache über Hoffnung in Krisenzeiten austauschen.

Ich hatte Gelegenheit unsere Flugzettel „Esperanto die Sprache des Friedens“ und „Esperanto gratis am Computer lernen“ vorzustellen und zu verteilen.



